

Heinrich Heine,
La malĝojulo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉiuj sentas en la koro
Veon pro la knabo ĉi;
Ĉar videblas la doloro
Ja sur la vizaĝ' de li.

Aerume malvarmigas
Kompatemaj ventoj lin,
Lin ridete refreŝigas
Kelka rifuzema in'.

El sovaĝa urb-bruado
Fuĝas li al la arbar',
Kie sonas bird-kantado
Kaj susuras la frondar'.

Sed la ĝoja kant' mutiĝas,
Tristas arbo kaj foli',
Kiam lante proksimiĝas
La malĝoja ulo ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Der Traurige" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-01-22.*

MR-116-1 / Arg-206-412 (2004-03-12 23:27:23)